


Ktp!

LA REVUO DE USONA
ESPERANTISTA
JUNULARO


Vol. 01, N-ro 06
Julio-Oktobro 1994



ESUNI

ETORI


S. W. LEE



Anjonghansejo!

Junuloj festas la 50an en Chonan

Seoul
South Korea



I hope it was as fun as the ones written about in this issue. We've created this special double-length issue to cover all the events of this summer.

This issue also marks addition to the staff and some superficial changes to the issue. Sybil Harlow joined our staff to help with the computer layout. If you have any suggestion's or questions for her you can send them to either the KTP address or sybilh@netcom.com.

We hope you enjoy this issue.

What's inside...

USEJa Biblioteka Katalogo.....	3
Bona NAJT por Ĉiuj	4-5
Bennem # 1	5
Ankaŭ la Angla estas	
Fandpoto de Kulturo	6
Poŝkartojn	6
Lingvaj Anguloj	7
Peace, Love and Understanding: Reflections on the 50th IJK .	8-9
Vi estas tio, Kion vi manĝas ...	10
Jarraporto de USEJ: '93-'94	11-13
Bennem # 2	13
Esperanto Presented at PA Governor's School	14-15

KTP!

624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
ISSN # 1078-6554

Founded in 1993, it is the official newsletter of the US Young Esperantists. It is published 6 times a year and sent out to all members and supporters of USEJ.

Contributions may be sent to the address above. Opinions expressed in articles are those of the author and not of USEJ or the Editor.

Fondita en 1993, ĝi estas la oficiala novaĵletero de la Usona Societo por Esperantista Junularo. Ĝi eldoniĝas 6 foje jare kaj estas dissendata al ĉiuj membroj kaj subtenantoj de USEJ.

Kontribuajoj estu sendataj al la adreso supre. Opinioj esprimitaj en artikoloj estas tiuj de la aŭtoro kaj nek de la Redaktoro, nek de USEJ.

Redaktoro/Editor: Jozef Truong
Artaĵoj/Art: Matthew Horton
Kompostisto/
Layout: Sybil Harlow

Limdato de venonta numero
Deadline for next issue:
la 5 de novembro '94
November 5, 1994

The Usej Library Finally Opens!



Post kelkaj Jaroj de Kolektado, la USEJa Biblioteko finfine malfermiĝos! Nun membroj havas bonajn eblecojn ekscii pli pri la movado, organizi ekzpoziciojn kaj klasojn, kaj lerni pri la diverseco de la Esperanta gazetaro.

Unless you're one of the few lucky esperantists who either have your very own Esperanto small collection or live close by one, you probably don't have too many Esperanto periodicals or magazines.


Fortunately that's about to change. The USEJ Library Collection will finally be "opened" in September, 1994.

The Library, the result of several years of collecting, features various publications from

around the world, ranging from typewritten local bulletins to full-color magazines . . . all available free of charge to USEJ members and patrons!

How do you use the Library? First write to USEJ's Central Office to obtain a copy of the current "Biblioteka Katalogo", which lists the magazines and specific issues which USEJ has. Write on a sheet of paper the titles and issue numbers of the magazines you would like to borrow, and then send it off to USEJ's Central Office.

There's currently a limit of five magazines at one time, so that everyone can have a chance to borrow something. The items can be checked out for up to thirty days, but there is no limit to the number of times you can use the Library during the year.



That's it.

Actually, there is a little more . . . for example, if you are organizing a class, exposition, or display. We'll send along a list of items which you'll be able to use in your display, such as posters, brochures, books, etc.

A majority of items in the Library are available through the kindness of numerous Esperantists. If you, too, have magazines in or about Esperanto which you don't need anymore, why not send them to USEJ?

The magazines won't have to spend the next fifty years in a trash pile somewhere and will instead be used to educate, entertain, and amuse a fellow USEJ member or patron. Everyone benefits — you, the magazines, other members of USEJ, and, of course, the collecting itself . . . who said you can't make everyone happy?

What? An international young Esperantist camp-out in the United States? That's a history-making event in itself. But you'll be even more surprised at how successful the camp-out really was.

Ĉu internacia junulara tendumado povus okazi iam en la usona Esperantujo? Jes, ĝi povus okazi ... fakte, jam okazis!

NAJT (Nord-Amerika Junulara Tendumado) ja estis tia kunveno (verŝajne, la unua tia konferenco en Usono). Dum la lasta semajnfino de aŭgusto, de la 26a ĝis la 28a, malgranda grupo de fervoraj Esperantistoj vojaĝis al la pitoreska urbo Pottersville en Novjorko por festi la finon de somero kaj la novan komencon por la junulara movado en Nordameriko.

La konferenco vere estis nordamerika, ĉar venis kelkaj kebekianoj. Nur mankis al ni la meksikanoj. Sed ni tute ne forgesis ilin (ni manĝis kelkajn meksikajn manĝaĵojn dum la semajnfino.)

Eble oni povus diri, ke la konferenco eĉ estis internacia ĉar ĉeestis tre diversnaciaj junuloj. Venis suden hungara studentino de Montrealo kaj venis norden argentina studento el Pittsburgh (sufiĉe longa vojaĝo por li!).

Ĉeestis ankaŭ la konata kroata aktivulo Zdravka Metz kaj (legu zorge) montrealano de nederlanda deveno, kiu loĝis kvar jarojn en la Filipinaj Insuloj, sed havas poŝtadreson en Belgio (liaj gepatroj nun loĝas tie) ... jes, tiel internacia kiel Esperanto mem!

Nu, sufiĉe pri tio. Vi certe interesiĝas pli pri la progamo mem, ĉu ne? Ne estis oficiala programo, do ni havis ŝanon vere ĝui la belegan lokon. kiun Brian Krueger (la organizanto de NAJT) tiel zorge elektis.

Kion VI farus se vi loĝus apud blua lago, puraj montetoj kaj kvazaŭ privata plaĝo? Ludi per karto, kompreneble. Kial ne? Dum la "rondoj" (mi ne certas, ĉu tio estas la oficiala vorto), ni havis multe da tempo por babilumi pri ĉio, aŭskulti Esperantajn kasedojn, kaj eĉ paroli serioze pri Esperanto (mi neniam komprenos, kial Esperan-



tistoj tiel interesiĝas pri gramatiko).

La sekvanta tago, kiam alvenis la kanadanoj, estis nia maloficiala ekskursita tago. (Noto pri Esperanto-kulturo: dum preskaŭ ĉiuj Esperantaj renkontiĝoj okazas almenaŭ unu ekskurso, plej verŝajne piedmarŝa. Do, ĉiam-ĈIAM- kunportu taŭgajn ŝuojn al ĉiuj e-aj eventoj kaj estu preta piedmarŝi. Devus esti, ke iu sportŝufabrika kiel Reebok aŭ Nike sekrete subtenas Esperantajn renkontiĝojn.)

Ni kune piedmarŝis al pinto de iu monto, de kie oni povas vidi la lagon kaj aliajn montojn. Ĝi ja estis fotinda, sed mi bonŝance forgesis mian fotilon en mia



Kion VI farus se vi loĝus apud blua lago, puraj montetoj, kaj kvazaŭ privata plaĝo?

Bona NAJT por Ĉiuj

tendo. Ne gravas. Ni restis tie nur kelkajn minutojn!

Ek' al la "kuirejo" por prepari la vespermanĝojn! Antaŭ ol mi venis, mi antaŭvidis, ke ni devas kapti kaj manĝi ursojn kaj aliajn bestojn. Bonŝance, mi malpravis (denove).

La manĝaĵoj estis ege pli bonaj ol mi pensis (laŭdojn al kuiristo(j)!). Eĉ la etoso estis tre ĝuebla. Ni ĉiuj sidis kvazaŭ familia ĉirkaŭ unu longa tablo, manĝante nudelojn kun multege da fromaĝo (tamen sen verdaj steloj, malgraŭ tio, kion diris la aliĝilo), panon, freŝan salaton ...

hmm, mi pensas ke mi malsatas...


Tuj poste okazis la evento, kiun mi senpacience atendis, la bivakfajro. (Kiel "urbulo", mi havas malmultajn ŝancojn vidi fajrojn.) Ĉirkaŭ ĝi, ni kantis kebekiajn popolajn kantojn, manĝis la usonan dezertaĉon nomatan "s'mores" (plejparte el la usonanoj manĝegis ĝin sed la kebekianoj ne tro bone komprenis kial iu eĉ kuraĝus manĝi tian teruran miksaĵon), kaj eĉ aŭdis koncerton de la fama kebekia grupo Akvo. (Verdire, nur duono da Akvo, la aliaj ne povas ĉeesti.) Ni eĉ klopodis danci

ĉirkaŭ la fajro, sed estas iom malfacile danci "La Bamba"-n kiam ĉeestas nur unu junulino.

Mirinda tendloko, bonaj manĝaĵoj, amika kaj amuza etoso, unikaj homoj ... ĉu NAJT sukcesis? Sendube, jes! Eble ne tiel gravas nun vojaĝi al alia flanko de la mondo por ĝui alt-nivelan kongreson. Vi nur bezonas ĉeesti NAJT-n!

— Joseph Truong

Lancaster, PA



English-speaking Esperantists are almost always interested in learning about other languages. But they might be surprised to find out just how intriguing their own language is.

Kiel Esperantisto, vi jam scias, ke la vortoj de Esperanto devenas el multaj aliaj jam konataj lingvoj. Tio estas vera ankaŭ por la angla! Jen kelkaj ekzempleroj pri la diversaj devenoj de anglaj vortoj:

Candy (dolĉaĵo) venas el la sanskrita vorto "khanda" kiu signifas "ero" aŭ "peco", sed plejparte signifas pri superpecoj.

Assassin (mortigisto) temas pri la fervoruloj da islama sekto dum la 11a jarcento en Persio. Ili sekrete mortigis siajn malamikojn nokte. Por senti pli forte kaj pli kuraĝe tiuj uloj fumis la drogaĉon "hashish" kaj sekve nomiĝis "hashshashin", el kiu la angla prenas la vorton assassin.

Chocolate (ĉokolado) estas formo de la azteka vorto "chocolatl".

Tarantula (tarantulo), pro iu kialo, devenas el itala danco, kiu havas la saman nomon. La danco venas el la itala urbo Taranto (certe, ne konfuzu ĝin kun Toronto, Ontario, kie espereble neniu tarantuloj loĝas).

Finfine, tiuj belegaj Canary Islands (Kanariaj Insuloj) fakte estas la hundaj insuloj! La nomo de la insulo venas el la latina vorto "canis" ("hundo") kaj tiel ne eĉ temas pri kanarioj. (Jes, estas malbonaj novaĵoj por birdamantoj ...)

-Jed Meltzer
(Telford, PA)

N(DLR): Malgraŭ la malfacilegeco de la angla, ĝi estas ankaŭ tre riĉa kaj unika lingvo, kiel la supra artikolo montras.

Pri la deveno de tiu plej malamata besto, la tarantulo, mi eble povos klarigi iom. Veŝajne, tiu araneo estis nomita por la urbo de kie ĝi venas. La fama danco kaj muziko (kiuj nomiĝas 'tarantella') estis kreitaj pro la araneo. Post kiam tia araneo mordas iun homon, tiu homo dancu la 'tarantella', kiu laŭdire savos la viktimon.

Kiu scias pli ekzakte la faktojn de tiu vorto aŭ de aliaj vortoj sciigu ankaŭ nin!

Jen kelkaj el la respondoj al nia demando, 'Kien en la mondo vi irus?':

Mi volus viziti la provincon Quebec. Mi amas la francan lingvon, kiun oni parolas en Quebec.


Ankaŭ, Quebec estas tre malnova, kaj mi amas malnovajn konstruaĵojn (kasteloj, katedraloj, ktp.)

Fine, mi volas aĉeti memoraĵojn de la glithokeaj teamoj tie, la Canadiens de Montreal kaj la Nordiques de Quebec.

--Theresa Makin,
Bethlehem, PA

Do, **KIEN VI DEZIRUS IRI??** Sendu viajn poŝkartojn anta la fino de la jaro al:

Ktp!
624 Second Street
Lancaster, PA 17603



Ni jam vizitis Hispanion en 1993, sed mi volas viziti ĝin, denove. Kial? Por vidi la imponan kastelon:

La Alhambra en Granada
Hispanio

Lisa Gonzalez,
Levittown, PR

Lingvaj Anguloj

Ĉi-numere, ni prezentos du el la lingvoj uzataj de indiĝenaj popoloj de Sudameriko. Sendis ambaŭ kontribuadojn Atilio Orellana Rojas de Coroba, Argentino. (Cetere, li instuos venontjare ĉe la Sanfranciskaj Esperantaj Kursoj ... se vi interesiĝas lerni pli, ja ĉeestu tiujn kursojn por paroli al li!) La unua kontribuado temas pri la kaljaŭaja lingvo.

Esperanto	Kaljaŭaja lingvo	Prononco
Saluton!	Lalle Kaman!	la <u>lje</u> ka <u>man</u>
Bonan tagon!	Lalle Kaman!	la <u>lje</u> ka <u>man</u>
Kiel vi fartas?	Kichayna achanki?	ki <u>ĉaj</u> na a <u>ĉan</u> ki
(Mi fartas) bone.	Uwarulla	u <u>u</u> aru <u>l</u> ja
(Mi fartas) malbone	U uwaruchu achani	u u <u>u</u> aru <u>ĉu</u> a <u>ĉa</u> ni
Mia nomo estas . . .	Miniyy . . .	mi <u>ni</u> ij
Ĉu vi parolas E-on?	Esperantota juyankichu?	esperantota ĥu <u>jan</u> ki <u>ĉu</u>
Dankon!	Uvarasqasunki!	uvaraska <u>sun</u> ki
Bonvolu	Uvaru jekaj	u <u>va</u> ru ĥe <u>ka</u> j
Kie vi loĝas?	Khiruipi kumanki?	khiru <u>ipi</u> ku <u>ma</u> nki
Kiom jara vi estas?	Ku'u mit'ayoj achani?	ku <u>hu</u> mi <u>th</u> ajo a <u>ĉa</u> ni

Jen pli konata sudamerika lingvo, la ajmara. Ĝi estas parolata de ĉirkaŭ unu ĝis du milionoj da homoj. La ajmara estas unu el la plej uzataj lingvoj de Bolivio kaj Peruo.

Esperanto	Ajmara lingvo	Prononco
Saluton!	Aski uruipanay!	aski uru <u>ki</u> pa <u>na</u> j
Bonan tagon!	Aski uruipanaj!	aski uru <u>ki</u> pa <u>na</u> j
Kiel vi fartas?	Kamisaki?	ka <u>mi</u> saki
(Mi fartas) bone.	Waliki	u <u>al</u> iki
(Mi fartas) malbone	Janiu waliktti	ĥa <u>n</u> ju u <u>al</u> ik <u>tti</u>
Mia nomo estas . . .	Sutijjajj . . .	suti <u>ĥa</u> ĥ
Ĉu vi parolas E-on?	Esperantot parlitati?	espera <u>nt</u> ot pa <u>rl</u> it <u>ati</u>
Dankon!	Yuspagara!	ju <u>s</u> pa <u>ga</u> ra
Bonvolu	Jumajj sapasktati?	ĥu <u>ma</u> ĥ sa <u>pa</u> sktati
Ĉu vi vendas panon, s-ino?	T'ant' utjamti, casera	th <u>an</u> th ut <u>ĥ</u> am <u>ti</u> , ka <u>se</u> ra
Jes	Jisa	ĥi <u>s</u> a

__ = stress

PEACE, LOVE AND UNDERSTANDING: REFLECTORS ON THE 50TH IJK

Kiel vi ja scias, ĉi-somere okazis la 50a IJK en Ĉonano, Sudkorejo. Por veteranoj de la IJK, ĝi jam estas longe atendata evento. Tamen, kiel la unua Esperanta renkontiĝo por juna usonano, la ĉi-jara IJK ĉiam restos io pli speciala.

Some people have asked me for my thoughts on the 50th Internacia Junulara Kongreso. All I can say is that the IJK was far too short. In my opinion, closer to two weeks would be necessary.

The IJK took place at the Dan Kook University in the city of Ch'onan, approximately sixty-five miles south of Seoul. The university is beside a beautiful lake, on the outskirts of the city.

For one week, the university became a part of Esperantujo, a true "Global Village". Nepalese and Chinese, French and Brazil-



ians, all chatting, walking, and interacting, recreated the atmosphere of the 1960's in the United States, "Peace, Love, and Understanding".

A typical day at the IJK started at nine o'clock, with a Korean breakfast of rice, soup, seaweed, fish and kimchi, which is cabbage fermented with red chili pepper and is quite spicy. One ate kimchi and rice at every meal.

I never quite got used to kimchi, but I did get accustomed to the rice at every meal and miss it somewhat now.

After breakfast, there were either lectures or activities to participate in, or excursions to take part in. I went to lectures on the Japanese religion Oomoto, the Americanization and commercialization of the world culture, and a course on Korean calligraphy and the Korean language, which is very difficult; it belongs to the same linguistic family as Hungarian and Finnish.

On the fifth day, Wednesday, I walked with a group of others some three miles to a Buddhist monastery where there was a giant bronze statue of the Buddha, the largest in southeastern



Korea. The Buddha had been built to express the desire of a unified Korean peninsula, which was the wish of all the Koreans I met.

At the Buddha, our group's leader, a Buddhist, led us in a Buddhist prayer. We lit three sticks of incense, circled the statue thrice, chanting Hamulamigul and then prostrated ourselves before the statue three times, each time touching our foreheads to the Earth. Beside the statue there was a spring, from which we all took a drink of water.

Another day we traveled to a recreated Korean folk village where the lives of Korean peasants and nobility were reenacted in traditionally built structures. Afterwards we traveled to the



brewery of the Oriental Beer Company. The tour was fairly dry, the best part being in a room where it was only 45°, a nice change after the 100° weather outside.

In the evenings, there was music, dancing and singing. People from various nations taught everyone traditional songs or dances. There was a French folk dance, a samba from Brazil, a "circle dance" from Ghana and various songs translated into Esperanto from German, Danish and British English.

This singing and dancing lasted until midnight, when the crazy "Discotheque" opened in the basement of one of the buildings. I stayed there, chatting and

snacking on french fries and an omelette-like egg dish. A few danced to the very loud Korean Rock. I usually stayed there until around 3 AM, but I knew some people who didn't sleep at all.

Sadly, I had to leave the IJK a day early in order to purchase a plane ticket out of Korea. I'd stayed the exact limit for a visa-less American. In all, the IJK was a fantastic experience and has strengthened my belief in Esperanto and my desire to attend the IJK '95 in St. Petersburg, Russia.

—Daniel Cuthbert

Guilford, CT

Vi estas tio, Kion vi manĝas


Despite the continuing health craze across the nation, there still remain quite a few people whose eating habits remain less than desirable. Here are some useful tips on how to make a simple start towards eating better, because, as you well know, you are what you eat

Plejparto da alilandanoj kredas, ke ni, la usonanoj, manĝas tre malbone kaj niaj manĝaĵoj estas tute grasplenaj. Cetere, ĉiuj jam scias, ke usonanoj estas kutime pli ol aliaj homoj en la mondo. Kial?

Kelkaj personaj pensas, ke ni manĝas tro da "rapidaj manĝaĵoj", ekzemple el McDonald's, Pica Kabano, Hamburgaĵa Reĝo, Tako-Sonorilo, Laktaĵa Regino, kaj tiel plu. Niaj vivoj estas tro plenaj da farenaĵoj, kaj do ni eble ne havas sufiĉe da tempo por manĝi pli bone.

Bedaŭrinde, multaj usonanoj ne povas aŭ ne volas ekzercumi por maldikiĝi. Oni kredas, ke rapida dietado estos sufiĉa por

maldikiĝi, sed dietoj ne funkcias sen fari ion kiel marŝadon, kuradon, aŭ sportumadon.



Kial la eŭropanoj verŝajne ne estas tiel dikaj kiel ni? Unue, ili manĝas malpli da graso kaj malpli da frititaj aĵoj. La tipa matenmanĝo en Francio, ekzemple, estas ege pli simpla ol la tradicia usona matenmanĝo. Ĉi tie, ni manĝas frititajn ovojn, ŝinkon, lardon, kolbasojn, krespojn, kremplenajn pasteĉojn, ktp. Francoj kaj ankaŭ aliaj eŭropanoj manĝas nur panon kun konfitaĵoj, frukton, jogurton kaj trinkas kafon.

Due, la eŭropanoj marŝas aŭ biciklas pli ol ni. En Usono, la homoj dependas tro multe je siaj aŭtoj kaj ne piediras tiel ofte.

Ĉu vi volas iĝi pli sana kaj havi pli bonan korpon? Kion vi povas fari por vivi pli sane? Jen kelkaj ideoj:


* Ekmanĝu malpli da graso. Nun sur la etikedoj de ĉiuj produktoj aperas detalaj informoj pri la gras-enhavo. Lenu kiom da graso via korpo bezonas.

* Manĝu pli da fruktoj kaj legomoj anstataŭ manĝi dolĉaĵojn aŭ ĉokoladon.

* Gravas, ke vi ekzercumu almenaŭ trifoje ĉiun semajnon! Marŝu, biciklu, aŭ ludu. Uzu vian korpon! Vi sentos vin pli bone.

Ni montru al la alilandanoj, ke ni povas vivi bone kaj sane! Bonan ŝancon kaj bonan apetiton!

—Todd Phillips
Austin, TX



Jarraporto de USEJ '93-'94

Here's a recap of what's happened in the last year in a nice little report. As you'll see, some things were actually accomplished this year, thanks to countless volunteers and helpers. And you. . . would you be interested in helping out? You'll definitely find something worthwhile to do in USEJ. Contact us!

Administrado

Sep membroj laboris en la estraro de USEJ dum '93-'94. Ili estis: Mark Armantrout (IN), Daniel Cuthbert (CT), Randy Dean (GA), Thomas Gray (TX), Jacob Schwartz (NC), Nathan Treadway (IN), kaj Joseph Truong (PA).


Randy Dean ĉeestis nome de USEJ la Nacian Kongreson, kie li multe parolis pri la agado de USEJ kaj pri junularaj aferoj.

Kvankam reprezentanto de USEJ, Daniel Cuthbert, ĉeestis la ĉi-jaran IJK-n en Sudkorejo, pro granda eraro de la direktoro, li ne rajtis oficiale ĉeesti la Estrarkunsidon dum la IJK.

Financoj

Dum la Nacia Kongreso, ELNA decidis starigi junularan fonduson el kiuj USEJ rajtas preni monon. Tiu fonduso enhavas nun ĉirkaŭ \$1200; tamen, \$600 estas bezonata de la CO de ELNA por dissendi nian novaĵleteron. Buĝeto por la venonta jaro estis sendita al ELNA nur antaŭnelonge kaj pro tio estas decidota de la estraro de ELNA.

Por prizorgi la novajn financajn aferojn, Nathan Treadway fariĝis kasisto. Dum la pasintaj monatoj, li plenigis la necesajn formulojn por akiri ĉekkonton por USEJ, impostan numeron, ktp.,



Daniel Cuthbert,
la reprezentanto de USEJ
ĉe la 1994 IJK

kaj restos kasisto dum almenaŭ unu plia jaro.

Bulteno

La unua numero de **KTP!** aperis novembre 1993. Dum la jaro aperis 6 numeroj (la plej lasta estis duobla numero), preskaŭ dumonate. La Centra Oficejo de ELNA dissendas ĝin al la membroj de USEJ. Entute, la Oficejo faras ĉirkaŭ 200 ekzemplerojn po numero.

Laboris plejparte pri **KTP!** Joseph Truong (redaktoro), Matthew Horton (CA) (respondeco pri artaĵoj), kaj kelkaj verkemaj membroj de USEJ. Ekde la lasta numero laboris ankaŭ Sybil Harlow (CA) kiel kompostisto.

La plej ŝatataj rubrikaj laŭ legantoj estis la bildstrio BENNEM kaj la lingva angulo. Placiis al legantoj ankaŭ la faktoj ĉe la fino de ĉiu pago, la grafikaj aspektoj, kaj la koncizaj paragrafoj ĉe la komenco de ĉiuj gravaj artikoloj.

Renkontiĝoj

Ĝis nun, USEJ ankoraŭ ne okazigis iun tutlandan kongreson aŭ renkontiĝon. Tamen, okazis almenaŭ unu junulara programo ĉi-jare.

La Nordamerika Junulara Tendumo (NAJT), organizita de USEJ-membro Brian Kruegar, okazis en Pottersville, NY— la 26an ĝis 28an de aŭgusto, 1994. Partoprenis entute 13 personoj (5 usonanoj, 8 kebekianoj).

Okazis neformala diskuto pri junularaj aferoj ankaŭ dum la Nacia Kongreso, kiun Randy Dean prizorgis.

Eksteraj Rilatoj Ekstermovadaj

USEJ ĉeestis la 1994an Nacian Studentan Trejnseminaron okazintan junio en Novjorko-Urbo. Tiun Trejnseminaron organizis la UNO-Asocio de USONO, kun kiu havas asociajn rilatojn ELNA. Daniel Cuthbert ĉeestis la Seminarion; ELNA pagis la partoprenkotizon. Krom tiu evento, tamen, neniuj aliaj laboroj okazis ĉi-jare pri eksteraj rilatoj.

Enmovadaj

Ŝajnas, ke ne ekzistas tiom da problemoj kun ELNA. ELNA daŭre montras sian subtenon de la junulara movado.

Krom TEJO, USEJ havas rilatojn ankaŭ kun Junulara Esperantista Franca Organizo, Junularo Esperantista Kanada, kaj Flandra Esperantista Junulara Organizo.



La partoprenantoj de NAJT,
la 26a-28a de aŭgusto, 1994

Ĝis nun, la rilatoj ne estis tre aktivaj kaj temas nur pri interŝanĝo de novaĵletoj.

Kunlabore kun la internacia gazeto **Kontakto**, USEJ okazigis kvizon okaze la '94 Futbala Mondpokalo. Partoprenis entute 30 junuloj el 15 landoj, do, laŭ la redaktoro, unu el la pli sukcesaj kvizoj. La premioj estis Mondpokalaj pingloj. Gajnis 5 junuloj el Argentino, Italio, Burundio, Alĝerio kaj Nepalo.

Propagando

Propagando de Esperanto dependas plejparte je la membroj mem. Ĝis nun venis tre malmulte da novaĵoj pri junuloj, kiuj reklamis pri Esperanto.

Cetere, USEJ aperis en la plej aktuala eldono de "Encyclopedia

of Organizations", sub "Cultural Associations-Esperanto". Tie aperas bazaj informoj pri la organizo.

Membroj/ Aktiveco

La nombro da aktivuloj restas preskaŭ senŝanga, 15 ĝis 20. Feliĉa novaĵero estas tio, ke kelkaj junulinoj

nun laboras por USEJ. Alia bona novaĵero estas tio, ke la aktivuloj vere loĝas en diversaj lokoj tra Usono kaj ne nur unu regiono.

USEJ havas 100 membrojn, kio estas malkresko kompare al pasintjare. Verŝajne tiu malkresko okazis ĉar kelkaj membroj jam atingis la aĝlimon.

Nova kategorio pri patronoj komenciĝis. Estis proponite al ELNA, ke patrono estu iu membro de ELNA, kiu kontribuas almenaŭ \$10 al USEJ. Ĉi tiel ni havas 4 patronajn membrojn. Tiuj membroj ricevas la samajn servojn kiel normalaj USEJ-aj membroj escepte de la voĉdono.

Loka Agado / Lokaj Klubo

Dum la Nacia Kongreso, ELNA donis premion al la plej aktivaj junularoj (unu por gimnazia nivelo kaj unu por universitata nivelo). Gajnis ĉi-jare la Societo por Esperanto ĉe MIT (Massachusetts Institute of Technology) kaj Esperanta Klubo ĉe la Guilford High School (Guilford, CT).

Ĝis nun, estas 7 junularoj aŭ kluboj organizitaj de junuloj en Usono: krom la du menciitaj supre, esta unu ĉe Horace Mann

High School (New York, NY); Arizona State University (Mesa, AZ); Yale University (New Haven, CT); Missoula Esperanto Society (Missoula, MT); kaj Bloomington Esperanto Club (Bloomington, IN). Bedaŭrinde, ankoraŭ ne okazis iu laboro pri lokaj kluboj.

Aliaj Notoj

ELNA= Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

IJK=

Internacia Junulara

Kongreso


UNO= Unuiĝintaj Nacioj

Nacia Kongreso= Nacia Esperanta Kongreso de ELNA

Tiu raporto validas por septembro 1993 ĝis aŭgusto 1994.

Ĉi tiun raporton verkis Joseph Truong.

Bonvolu sendi viajn ideojn, demandojn, kritikojn, ktp., al la Centra Oficejo de USEJ pri la Jarraporto por ke la venontjara raporto estu pli utila kaj informplena.



Ĉiujare, en ŝtato Pensilvanjo, okazas altnivelejoj, dumsomeraj lernejoj nomiĝas Ŝtatestraj Lernejoj ("Governor's Schools") pro diversaj fakoj, kiel matematiko, arto, scienco, ktp. Ĉi tiujn lernejojn ĉeestas gimnazianoj elektitaj el miloj da aliĝoj tutŝtate. Tiuj lernantoj lernas kaj loĝas kune kvin aŭ ses semajnojn ĉe gastigantaj universitatoj tra la ŝtato.

Du el niaj membroj ĉeestis la Lernejojn ĉi-jare kaj sukcesis uzi Esperanton kaj paroli pri ĝi kun la aliaj talentaj kaj inteligentaj junuloj, kiuj ĉeestis la programojn. Jen ili rakontas iom pri siaj spertoj:

Pennsylvania Governor's School For Teaching

From July 10 to August 13, I attended the Pennsylvania Governor's School for Teaching. PGST is a five-week summer program held at Millersville University for sixteen- and seventeen-year old students from throughout the state who have an interest in the field of education.


For two weeks of the program, we had the opportunity to teach 52 nine-and ten-year old students from the Lancaster area. We chose the lessons, which we taught to the students ourselves; my choice was to teach the students the colors in Esperanto.

I taught the Turtles (eight children) and the Octopi (five children) a brief lesson (45 minutes) about the use of Esperanto and the colors. I only planned to teach red, orange, yellow, green, blue, purple, and brown, but the children were naturally curious. They asked me about other colors and other words: "What is 'pink' in Esperanto?", "How would you say my name in Esperanto?"


My greatest satisfaction was the impact my lesson had on my PGST classmates. Our final project at Governor's School was to design a model school, complete with curriculum and staff.

West Haven Academy, designed by sixteen of the students, decided to offer Esperanto as one of its languages. These model schools, I might add, are presented before superintendents and education officials from all over Pennsylvania. One never knows where an idea may lead!

-Theresa Makin
Bethlehem, PA



Theresa Makin teaches Esperanto at the Pennsylvania Governor's School



Pennsylvania Governor's School For International Studies

While Therese was here in Lancaster, I was in Pittsburgh, where the Governor's School for International Studies was being held. This intensive five-week course at the University of Pittsburgh featured topics such as economics, intercultural communications, foreign policy making, etc.

Esperanto was mentioned early in the program. In fact, it was first mentioned during a speech on languages of the world, when

another student asked the lecturer about "a language in the '20's which was created to be used worldwide".

Fortunately, the lecturer knew which language the student was asking about. But she thought that it'd be better for me to explain about Esperanto, since I had mentioned it on my application. So (surprise surprise) I was called down on the spot to speak in front of 110+ students and teachers about and in Esperanto.

To reinforce what I had said about Esperanto, I also wrote an article afterwards about the language, its uses, how to learn

it, etc., for the school newspaper, the "grapevine".


I was pretty surprised later to find out how interested most of my classmates were in Esperanto. Thanks to both the informal speech and the article, some of the students were even interested in starting the correspondence course, both by regular mail and by E-mail. At the very least, there are now 100 young people throughout Pennsylvania who know that Esperanto still exists and that it's just as useful now as ever.

—Joseph Truong
Lancaster, PA

KTP!

**624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114**

ISSN # 1078-6554



Inside:

- **The NAJT gathering**
- **The LJK**
- **2 Bennem cartoons**
- **and much more ...**